

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

KONKURSA REGULARO PRI PENTRADO POR DULINGVAJ VERKOJ

PREMIO "ANGELO SORANZO" - JARO 2014

Regularo

Art. 1

Partopreno estas senpaga.

Je libera temo, la konkurso akceptas kiun ajn teknikon, inkluzive de "glulaboraĵoj", "mozaiko" kaj perkomputila grafiko.

Ĉiu verko devas enteni tekston, de almenaŭ du vortoj: en esperanto (skribita en verda koloro) kaj en unu el la lingvoj de Eŭropa Unio (skribita en alia ajna koloro).

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per ellaboraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, sen eventuala kadro. La perkomputilan grafikajon oni prezentu en printita formo, en dimensio maksimuma kiel menciite, kun aldonita dosiero por ebla uzo laŭ art. 4.

Art. 2

Sur la verka malantaŭo devas esti la aŭtoraj donitaĵoj kaj la titolo, en kiu ajn lingvo. Krome, ĝi estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkroĉado surmura.

Art. 3

La Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn:

1-a premio - € 450

2-a premio - € 250

3-a premio - € 150

Speciala premio por la plej signifa teksto: € 100.

Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta Esperanto-Asocio partopren-diplomon.

Art. 4

Triesta Esperanto-Asocio retenos la premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reproduktorajton.

Art. 5

Enskribiĝo kaj transdono de la pentraĵoj okazos - **en 2014** - ĉe la sidejo de TEA (via del Coroneo 15, 34133 Trieste) en la koncernaj vendredaj tagoj de la marta, maja, junia kaj septembraj monatoj, ekde la 19.a horo ĝis la 20h30.

Art. 6

La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe la TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankoraŭ difinendaj, en **novembro 2014**.

Art. 7

La premio-disdonado okazos la **6.an de decembro 2014 je la 18-a horo**, ĉe la TEA-sidejo.

Art. 8

La nepremiitaj verkoj estos je dispono de la aŭtoroj en la **vendredoj de januaro 2015**, ekde la 19-a horo ĝis la 20h 30.

Se ĝis la fino de januaro 2015 oni ne reprenis sian pentraĵon, tiu iĝos posedaĵo de TEA, kune kun ties reproduktorajto.

Art. 9

La juĝo de la Art-komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla.

La Organiza Komitato, kvankam garantiante ordinaran gardadon de la transdonitaj verkoj, tamen ne respondecas pri ŝteloj kaj/aŭ domaĝoj eventuale okazontaj.

La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

Art. 10

Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitajn datenojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

Art. 11

La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursaĵoj.

Por ĉiu ajn informo kaj por ricevi la konkursajn regularon kaj partoprenilon, kontaktu la organizanton. Bonvolu disvastigi ĉi konkurson!

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Telefono 331-4805706

E-mail: esperantotrieste@yahoo.it, nored@tiscali.it,

testudo.ts@gmail.com

<http://tea1906.altervista.org>

Oni atentigas, ke facile troveblas, interrete, vortaroj pri Esperanto, ekzemple ĉe:

<http://hvortaro.altervista.org/>

http://www.lexicool.com/dictionaries_esperanto.asp?IL=2